

# La letero de l' Akademio de Esperanto

N-ro 25 : Oktobro – Novembro – Decembro 1993

ISSN 0986 - 1181

Ĉefartikolo

## Antiuniversalismo



Per tio mi aludas iun specon de ŝovinismo, kiun oni trovas ĉe kelkaj Esperantistoj! Ĝi estas iu naciismo, kiu koncernas la nacian landon, sed ne normale : ĝi limiĝas al la nacia Esperanto-asocio kvazaŭ levita al la rango de nacia teritorio! Ĉe Esperantistoj, kiuj principe estas turnitaj al la tuta mondo ĝi estas principo fundamente "anti-universalisma"!

Nuntempe la ĉiulanda gazetaro abunde parolas pri la Kurdoj kaj Kurdistanono. Tio estas la nomo de la teritorio en kiu ili vivas, kvankam ĝi ne konsistigas ŝtaton. -*istano* funkcias kiel la sufikso -*io* : ĝi estas same internacia kaj uzata en praktike ĉiuj lingvoj kaj ĝi same nomas ne ĉiujn, sed difinitajn teritoriojn. Kiel -*io* ĝi estas elemento de propra nomo. Estas vere, ke ĝia uzado limiĝas al iuj Aziaj teritorioj. Eks-Sovetio volis forigi tiun sufikson, nomante *Uzbekio* landon, kiu ĉiam kaj daŭre kaj ankoraŭ nomiĝas *Uzbekistano*. Tamen ili ne havis la tempon kaj la kuraĝon envicigi ankaŭ la nomon de *Afganistano*. Eble Esperantistoj aŭdacos fari, kiĉon ne faris unu el la lastaj koloniaj imperioj de nia mondo, malgraŭ la konata slogano : "atentu la ekster-Eŭropanojn!". Cetere la Azia sufikso bone hejmiĝis ankaŭ en Esperanto, kiel montris niaj Uzbekaj amikoj.

La demando estas ĉu la Kurdoj estas Turkoj, Irakanoj aŭ Sirianoj? Fakte ili estas unue Kurdoj; eventuale ili estas ankaŭ io alia! Tamen nur ĉiu el ili povas respondi por si mem! Sed la problemo estas la sama por ekz-e, la Skandinavo, kiuj povas esti Danoj, Svedoj aŭ Norvegoj, kvankam ilia ĉiutaga vivo feliĉe estas pli paca! Aŭ ankaŭ, ekz-e, la Nederlandanoj. Tamen Frisoj estas nacio, kiu loĝas marborde ĉefe de Nederlando, sed ankaŭ de Germanio. Ili nomas sian landon *Frislando*. Ekzistas ankaŭ German-lingvaj Nederlandanoj en Limburgo! Iuj esperus logikigi kaj trudi nian lingvon kaj nomi ilin per "*Nederlandianoj*" aŭ mi ne scias per kiu barbarismo! Mi eĉ ne mirus, se iuj baldaŭ inventus *Nederoj*, *Nederio* kaj *Nederianoj* por kontentigi tian falsan esprim-bezonon!

Mi publike demandas al tiaj Esperantistoj, ĉu ili estas tiel fidantaj pri la ĝusteco de siaj neologismoj kaj ĝis kie ili pretas klopodi? Ĉu ekzemple Koreanoj kaj Ukrainanoj estas pretaj peti sian respektivan registaron ŝanĝi la nomon ankaŭ en la nacia lingvo? En la Ukraina lingvo la nomo estas *Ukrajna* (*Ykraïna*) kaj precipe la anoj nomiĝas per derivaĵo *Ukrajnci* (*Ykraïnci*)<sup>1)</sup>. La diversaj lingvoj unuanime sekvas tiun skemon. Se obei la Fundamenton oni do devas diri *Ukrajno*, *Ukrajnanoj*! Tiel same por *Koreo*, *Koreanoj*. Eĉ la Koreaj aŭtoritatoj sensanĝe uzas la Anglajn *Korea* kaj *Korean* por la poŝtmarkoj kaj la aerlinioj. Neniu Koreano postulis, ke oni ŝanĝu tion al *Koreia* kaj *Koreish*; kvankam precedentoj jam okazis. Ekz-e, la Franca nomo *la Nigéria* estis ŝanĝita al *le Nigéria* de la Niĝerianoj mem, kiuj ja ne uzas la Francan lingvon sed la Anglan : ili opiniis, ke viringenra nomo estas malpli nobla ol virgenra!

Ni neniam forgesu, ke Esperantistoj ne rajtas nomi popolojn aŭ landojn. Tiun rajton havas nur la koncernaj popoloj. Esperantistoj devas trovi ekvivalentojn al la plej internacia formo de ĉiu nomo.

Niaj antiuniversalismaj malsamideanoj preferas malobei la Fundamenton ol lasi sian ŝovinismon flanken! Aliaj eĉ vendis la Fundamenton por ekhavi materiajn avantaĝojn!!

D-ro André ALBAULT

1) Detalojn, ankaŭ pri la transskribo, vidu en :

Albault André : *Multi-lingva glosaro pri land-nomoj*. Komplemento al "Vojaĝo tra la landoj". Saarbrücken : Iltis 1991. 124 p. [pri "Ukrajno" vd. la plenpaĝon 90].



## FINE DE 1993

En la pasinta monato Novembro (dum la 8-a INTERNACIA FESTIVALO organizita en Parizo) okazis tre interesa forumo-debato pri la beletro en Esperanto.

Dum tuta mateno estis pridiskutataj diversaj demandoj : – *Ĉu indas traduki? – Ĉu la tradukarto estas pli plezuriga en Esperanto? – Ĉu mankas elvokivaj adjektivoj? – Ĉu la traduko havas "pontlingvan" celon? – Ĉu ekzistas detradukoj en etnajn lingvojn? – Ĉu la lingvo posedas propran estetikon? – Aŭ ĉu oni povas paroli pri ia universala estetiko?*

Ĝuste en la nuna tempo, kiam ŝprucas tiom da kritikaĉoj kaj negativaj respondoj, jen kio montriĝas pli pozitiva, konstruiva kaj komfortiga!

Por Esperanto la XX-a jarcento iel similas al tio, kio estis la XVI-a jarcento por la Franca lingvo, kiam la sepmembra Plejado tradukadis el Latino kaj Helleno por riĉigi la lingvon, – kiam Rabelezo skribis (III, 19) : *"Estas troigo diri, ke ni havas lingvojn naturajn, la lingvoj estiĝas pro konveneco inter la popoloj . . ."*, – kiam la poeto du Bellay respondis al paroĥaj ŝovinistoj kaj kleraj snoboj per sia laŭda am-deklaro al la eta kaj granda patrujoj : *"Plaĉas min . . ."*

*"Pli mia Liréeto, ol monto Palatina,*

*"Kaj pli ol maraero, tiu mildec' Anĵua . . ."* (Soneto XXI)

*"Franci', Franci', respondu al mia plend' anhela."* (Soneto IX)

Ja kun la Lingvo Internacia la homo akiras trioblan kultur-identecon : regionan, nacian kaj tergloban; kaj tiuj tri aspektoj ne kontraŭu unu la alian, ĉar ili mem koncentriĝe ŝoviĝas unu en la alian.

Ĉi-jare en la 5-a INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCO de OSIEK mi provis esplori la demandon : *"Kio instigas al verkado en Esperanto?"* Prezentiĝis tri *"specoj de motivoj : la riĉeco de la lingvo-esprimivo, la kultura vehikleco de komuna lingvo kaj la bezono de komunajo-kulturo"* (La Gazeto, n-ro 48). Ĉiu lingvo same kiel ĉiu muzik-instrumento havas sian apartan voĉkoloron, sed ĉi-rilate Esperanto estas komparebla kun tuta orkestro . . . Tiele, sama esprimo povas esti laŭ strukturo analiza : *"La palaco de la reĝo"*; laŭ pli kvalifika : *"La reĝa palaco"* aŭ *"La palaco reĝa"*; kaj laŭ sinteza : *"La reĝpalaco"*. Tian unikan elastecon ni ja konservu, ĉar – kiel skribis D-ro L. L. Zamenhof – *"En lingvaj demandoj ĉiu superflua decido katenas."*

J. T.

---

*La Redakcio esprimas siajn korajn bondezirojn  
por 1994  
al ĉiuj gelegantoj de  
"LA LETERO".*

---

# Nia Kolokvo

”La Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo” estas temo, kiu certe lasas neniun el ni trankvila. En kiu stato fakte nun troviĝas nia kara lingvo? Ĉiu el ni havas sian propran opinion kaj sintenon rilate ĉi demandon. Kaj la estonteco? Tiukaze certe la diverseco de niaj rigardoj kaj prognozoj, kiuj, ĉiuj montrantaj kaj strebon pri objektiveco kaj ofte influon de multaj antaŭjuĝoj aŭ male neobjektivan fervorecan blindon, estos eĉ pli bunta.

Ĝuste pro tiu interŝanĝo de opinioj pri tia temo el diversaj vidpunktoj kaj laŭ diversaj trajtoj kaj aplikebloj estas nepre bezonata, utila kaj devus rezulti en novajn rigardojn kaj konkludojn. Tio certe estas subtenata ankaŭ pere de la disdivido de la kolokvo en unuopajn fakojn :

- *La lingvo Esperanto;*
- *Kulturportanto Esperanto;*
- *Lernobjekto Esperanto;*
- *Sciencobjekto Esperanto;*
- *Fakaj aplikoj de Esperanto;*

– *Esperanto en la opinioj de la ekstera mondo;*

– *Esperanto kaj informado.*

Mi, kiu transprenis la organizan flankon de la kolokvo, petas ĉiujn vin, ĉu Akademianojn, ĉu ceterajn samideanojn, kiuj, legante la *Leterojn*

*de l' Akademio*, montras sian profundan intereson pri la lingvo, ke vi ne nur uzu la proponitan eblon por vi mem, sed ankaŭ pripensu, kiu el viaj konatoj povus pliriĉigi la programon per siaj opinioj kaj proponu al ili aktivan partoprenon. Estas vero, ke multaj esprimis ĝis nun grandan komprenon pri graveco de la Kolokvo, sed nur malmultaj (konkrete nur 11) sendis sian antaŭaliĝilon. Do precipe vi, kiuj planas venon, sed ankoraŭ ne antaŭaliĝis, ne hezitu kaj nun sendu siajn aliĝilojn kaj resumojn de prelegoj, ke ni povu kiom eble plej frue vidi, kiom fortaj estos la unuopaj fakoj.

Petro Chrdle, Sek. de la Kolokvo

## Gravaj informoj pri la Kolokvo

**Konsila Komitato de la AdE-Kolokvo :**

- *Albault André, prezidanto de AdE kaj de la Kolokvo;*
- *Blanke Detlev, estrarano de CED;*
- *Bormann Werner, vicprezidanto de AdE kaj estrarano de TEC;*
- *Chrdle Petr, estro de KAVA-PECH kaj sekretario de la kolokvo;*
- *Frank Helmar, prezidanto de AIS;*
- *Idzerda Saskia, prezidanto de TEJO;*
- *Kiselman Christer Oscar, ĝen. sekr. de Akademio Komenius;*
- *Oljanov Violin, vicprezidanto de AdE;*
- *Pennacchiotti Fabrizius, vicprezidanto de AIS;*
- *Peyraut Yves, prezidanto de SAT;*
- *Tonkin Humphrey, prezidanto de CED;*
- *Urbanová Eli, membro de AdE el Prago;*
- *Wells John, prezidanto de UEA.*

**Aliĝkotizoj por la partoprenantoj de AdE-Kolokvo :**

	ĝis 94-02-15	ĝis 94-04-07	pli poste
Unuopulo :	120.- DM	150.- DM	180.- DM
Geedzoj :	200.- DM	250.- DM	340.- DM

Partoprenantoj el la B-landoj (laŭ UEA) ĝuos 50%-an rabaton.

La aliĝkotizo inkluzivas krom la luprezoj de bonkvalitaj salonoj kaj administraj elspezoj ankaŭ *du volumojn kun la prelegoj* kaj ĉefaj trajtoj de la diskutoj, same kiel komunan kulturalan programon. Por la akompanantaj personoj ĝi inkluzivas ankaŭ la turisman programon dum la faka programo de la kolokvo.

**Prezoj de la loĝigaj kaj gastronomiaj servoj :**

Tagmanĝoj kaj vespermanĝoj en la kolokvejo dum la tuta semajno 165.- DM

Tranokto en tristela hotelo kun matenmanĝo, po persono kaj tago

en dulita ĉambro 76.- DM

en unulita ĉambro 89.- DM

aldona lito en dulita ĉambro 33.- DM

Tranokto en dustela hotelo kun matenmanĝo, po persono kaj tago

en dulita ĉambro 40.- DM

en unulita ĉambro 60.- DM

Tranokto en unustela hotelo kun matenmanĝo, po persono kaj tago

en unulita ĉambro 39.- DM

en dulita ĉambro 26.- DM

en trilita ĉambro 23.- DM

Turisma hotelo, plurlitaj ĉambroj, necesejo kaj duŝejo trans koridoro,

po persono kaj tago 14.- DM

Amasloĝejo sen matenmanĝo, en propraj dormosakoj 9.- DM

Ĉiu aliĝinto (la aliĝo validas nur post pago de la kongreskotizo) ricevos precizajn informojn pri la programo, priskribon de la hoteloj, tranoktejoj, kaj proponon de la ceteraj ofertoj kun la mendilo.

Kontaktadreso, al kiu vi direktu la aliĝilojn kaj viajn demandojn, resp. rimarkojn :

Petr Chrdle, sekretario de la AdE-Kolokvo, Anglická 878, CZ 25229 Dobřichovice  
Tel./Fakso : x42.2.9912126. Bankkonekto : Komerční banka Praha-Smíchov, Kontonumero 555444-051/0100. — aŭ UEA-konto : pchr-s. — aŭ AIS-servobonhavo : 1690 AD 004

---

**ALIĜILO al la AdE-Kolokvo, Prago, 1994-07-07/07-17**

Kompleta nomo :

Adreso, telefono, fakso :

Eventuala prelego en la fako :

Titolo de la prelego :

(kaze de aliĝo kun la prelegpropono bv. kunsendi koncizan resumon, ne pli ampleksan ol 150 vortojn)

Akompanantaj personoj :

Rimarkoj :

Mi konscias, ke la kotizo ne estas repagebla, krom se la kolokvo pro iu kialo ne okazos (tiukaze ĝi estas centprocente repagebla). Krome mi konscias, ke la kotizo ne inkluzivas asekuron, pri kiu mi zorgas mem.

Loko kaj dato :

Subskribo :



# Dosiero pri la signifo de Ukraino / Ukrainoj

Ni ĉi-sekve donos leteron de S. Pokrovskij kun al-  
dono de sep redakciaj piednotoj. Poste ni reprenos du  
peĉojn el tiu letero kaj donos niajn komentojn.

## La letero de S. Pokrovskij

La Letero n-ro 24 malfermiĝis per tre diskutiga ĉefartikolo "Magia kompreno" de d-ro A. Albault. Kvankam la malbeninda problemoj pri la landaj kaj etnaj nomoj estas nesolvebla <sup>1)</sup>, mi riskas prezenti kelkajn konsiderojn.

1. Ne ĉiu nacilandano estas ĉefnaci-ano. Nia prezidento Jelcin tre zorge tion distingas, adresante siajn paroladojn ne nur al Rusoj, sed al ĉiuj *Rusianoj* (do, ankaŭ al Tataroj, Baŝkiroj, Jakutoj kaj aliaj popoloj de la Federacio, kiuj nepre volas konservi sian apartan nacian nomon. Ne ĉiu Rusiano estas Ruso, same kiel ne ĉiu Alĝeriano estas Alĝerano <sup>2)</sup>).

Ĉi tie kuŝas pli profunda problemoj : kio estas *nacio*? Ŝajnas, ke por la Francoj kaj por la Usonanoj tiu koncepto (preskaŭ) egalas *ŝtatanaron*, dum en Germanio kaj pli oriente (kaj ankaŭ en la Zamenhofa Esperanto), la signifo de la vorto pli proksimas al ĝia Latina etimo <sup>3)</sup>.

2. La Zamenhofa landnoma teorio de LR 47 estas ne perfekta, sed sufiĉe bona kompromiso; pli grave, ĝi estas *lingva fakto*, kiu ĉiam restos ne malpli aŭtoritata ol rekomendo de la Akademio <sup>4)</sup>. La ĉefartikolo zorgas pri la internacia publiko, sed *neniel* atentigas tradicion Esperantan <sup>5)</sup>.

Neniu Esperantisto miskomprenus, ke *Ĉino* aŭ *Japano* estas landoj, kvankam ĝuste tia estus la "internacieca" interpreto. Ke ilia najbaro KOREO ne estas egale traktata de la Akademio estas stranga kaprico, sed "kial lasi ĝin simpla, se ĝi povas esti komplika?" tute prave demandas la aŭtoro <sup>6)</sup>.

3. La sorto de Ukrainoj estas kurioza ekzemplo pri neatenditaj sekvoj de politika kaj lingvoplanadaj decidoj.

Dum la tuta 19-a jc. la Rusa registaro faris ĉion eblan por forviŝi la malgravajn (laŭ ĝia opinio) deviojn de la Ukraina popolo disde la *Grand-Rusa*. Tre logike oni indikis, ke *Ukraina* signifas "limlando", do ĝi neniel estas nomo de aparta nacio, ĝi estas nocio pure geografia, ktp.

Tiu imperiisma vidpunkto enradikiĝis en la Esperantaj vortaroj PV, PIV ktp., kiuj difinas *Ukrainojn* kiel *landon* (la sennaciismo kaj imperiismo ne identas, sed havas nemalgrandan komunaĵon) <sup>7)</sup>.

Nu, al ĉiu Sovetiano jam estis evidente, ke temas pri aparta nacio, sed por resti lojala al la kara PIV oni faris novan vorton, *ukraino*, kiu estas same (mal)proksima de la originala *Ukraina*. Ĉar tiun vorton PIV ne difinas, ĝi ne estis senigita je la nacia digno; al tiu vorto oni transportis la sopiratan signifon de *gentano*, obstine rifuzitan de la Cara registaro kaj de la Esperantaj Instancoj, kaj malgraŭ ĝia ĝena *-ino* tiu embarasa formo estas bazo de la oficiala nomo de la landa asocio <sup>7)</sup>.

S. Pokrovskij (el Novosibirsk)

1) La problemoj kiel ĉiuj aliaj estas perfekte solveblaj, se oni pretas racie aliri ĝin kaj ne aldoni al ĝi krom-problemojn, pri kiuj ĝi neniel respondecas!

2) Nenio estas komparebla : "Rusiano" volus eventuale signifi "ali-etnano"; sed envere ĝi estas nura sinonimo de "Ruso". "Alĝerano" estas nomo de urbano, "Alĝeriano" – de landano!

3) Jen unu el tiuj flankaj problemoj, pri kiuj mi aludas en noto 1). La semantiko de "nacio" certe estas interesa, sed ĝi malmulte rilatas kun la nomenklaturado de landnomoj kaj de iliaj anoj, ktp!

4) Konsilindas studi almenaŭ la ĉapitron 3 (Zamenhof kaj la Eŭropaj lingvoj) de "Vojaĝo tra la landoj" antaŭ ol aserti ion tian. Pli ol verŝajne ne Zamenhof kreis tiun teorion, sed ja de Beaufron-  
t! – Plie, ĉu lingva fakto, devas esti fetiĉo? Multaj akuzativ-eraroj estas lingvaj faktoj! Ĉu ni adoru ĉiujn lingvajn faktojn? Vd. la leteron de Hauptenthal sur p. 7.

5) Esperanta tradicio devas esti universala, monda; se male, ĝi estas nur "provincialismo" laŭ la vortoj de Zamenhof.

6) En la nuna mondo la ne uzado de KOREO apud Nederlando, Nepalo k.m.a. estas la plej unua kaprico. El du uzadoj, la Akademio statute ne povis elekti la kontraŭ-Fundamentan. Ĝi malprave allasis la ne kontestatajn Ĉinio kaj Japanio; ĝi konsideris tion kiel kompromison : cetere la internacieco de tiuj du nomoj estas bagatelaj. Dum tiu de Koreo estas admirinda. Oni vidas la konsekvencojn : por eviti miskomprenon la Koreanoj uzas la Anglan nomon (Korea) en siaj adresoj [Koreujo - Koreio = Korea]. Kaj tio estas simple ridinda.

7) Kiom da senutilaj klopodoj, kiuj neniel rilatas al la problemoj! Krom mikso de faktoj kaj formoj : ja la Ukrainanoj uzas la radikon *ukrain/* (kun ne Fundamenta senco).

# La debato

*El la ĵusa longa letero de samideano Pokrovskij, kiu skermas por la kontraŭ-Fundamenta Ukrainio, ni eltiris du pecojn A kaj B, kiuj meritas respondon per si mem. Sed por ke la afero estu klara, ni unue devas establi la kernon de la afero.*

## La kerno de la afero :

a) Kiel ordinare por ĉiuj landnomoj, ĉefa estas la internacia strukturo : *Ukrajn/an-*, trovebla en ĉiuj lingvoj. Per si mem ĝi determinas la signifon de la Esperanto-radiko (15-a Regulo de la Fundamento), kiel landon

b) Malĉefaj estas la diversaj nacilingvaj formoj de la radiko (*Ukrajn-*, *Ukrajn-*, *Ukrain-*, *Ukren-*, *Ukrani-*, ktp), en kiuj la *i* estas diverse traktita, povas malaperi (ai > e), transpasi la konsonanton aŭ eĉ reaperi en la nuran sufikson (*i-an*).

c) Ankaŭ malĉefa estas la etimologio en la Ukrain lingvo mem. Ĝi nur donas klarigon, kiu konfirmas la punkton a). Sed eventuale ĝi ne povus oponi al tiu punkto, ĉar la 15-a Regulo koncernas nur la internaciecon!

**Peco A.** *"Nia Prezidento Jelcin tre zorge tion distingas, adresante siajn paroladojn ne nur al Rusoj, sed al ĉiuj Rusianoj (do ankaŭ al Tataroj, Baŝkiroj, Jakutoj kaj aliaj popoloj de la Federacio, kiuj nepre volas konservi sian apartan nacian nomon). Ne ĉiu Rusiano estas Ruso, same kiel ne ĉiu Alĝeriano estas Alĝerano."*

Ni tuj rimarku, ke Jelcin disponis pri la Rusa lingvo, en kiu estas du radikoj *rŭs/skuŭ*, /*skue* (*Rus/o*, /*oj*) kaj *Rossŭa* (*Rusio*) kaj ke de la dua ĝi derivas *Rossŭ/ĝnun*, /*ĝne* (ne Rusaj anoj de Rusio). Ĉar Esperanto posedas nur unu radikon laŭ la internacieco, konvenas klarigi la duan Rusan nomon kaj ne forkaŝi ties signifon per simpla kaj tro ne klara sufiksado : tia nekutima derivaĵo ne povas signifi ion klaran por ne inicitoj, t.e. por ne Rusoj kaj por ne Ruslandanoj.

Plie kaj supozeble Prezidento "Jelcin" ne jam parolas en Esperanto (?). Do verŝajne li diras, kiel ĉiuj Prezidentoj en la Mondo "*Ukrajno kaj Ukrainanoj*" (ĉiu *sialingve*). Neniu el ili *sialingve* diras *Ukrainio*, kaj ankoraŭ malpli *Ukrajno* por la homoj : temas nur pri inventitaj propraj nomoj, "*Volapukoidaj*" nomoj, troveblaj nur en iaj Esperanto-tekstoj. Zamenhof avertis kontraŭ Volapuko, kies aŭtoro rekreis ĉiajn proprajn nomojn (*Yuro* = *Eŭropo*; *Merop* = *Ameriko*).

Aliflanke la Akademio pravis konsideri, ke en Esperanto *Ruso* kaj *Rusiano* estas sinonimoj kaj do ke la dua estas ne konsilinda! Efektive ni jam montris, ke multaj derivaĵoj estus vaste miskomprenataj, ĉefe por tiaj formoj ne vaste uzataj! Aliflanke tio establis diskriminacion por nomoj kiel *Nederlando*, kiu ne povus havi du derivitajn nomojn : unu por la propraj naciaj parolantaj la *Nederlandan*; alian por la aliaj civitanoj, parolantaj jen la *Frisan*, jen la *Germanan*!

## Zamenhofa esprim-rimedo akceptebla de ĉiu :

Tamen oni devas agnoski, ke ekzistas alia esprim-rimedo, kiu devus kontentigi ĉiun kaj kiu estis proponita

de Zamenhof mem. Li ofte parolis pri *Rusaj* kaj pri *Ruslandaj* Esperantistoj. Eblas do diri *Ruslandanoj*, *Ukrajlandanoj*, *Nederlando-landanoj* . . . Do *Ruslandanoj* estus verŝajne la plej ĝusta traduko por la Rusa : *Rossŭane*. Okazas neniu diskriminacio, neniu ambigueco : la formoj estas klaraj kaj de ĉiu kompreneblaj; ili bone sidas en Esperanto. Cetere oni renkontas sufiĉe ofte tiajn formojn : *Ruslanda*, *Hungarlanda*. Aprobindaj ili estas uzendaj!

## La internacia sufikso -i- estas "nom-elemento"!

La esenco de la afero estas, ke la sufikso *-i-* fakte estas nomo, aŭ se oni preferas, "nom-elemento". Iuj landoj alprenis ĝin, aliaj ne! Ekzemple, *Beneluxo* ne prenis ĝin sed *Tanzanio* ja alprenis ĝin. Tamen la du nomoj estas similstrukturaj : *Benelux/o* = *Be(Igio)* + *Ne(derlando)* + *Luks(emburgo)* + /*o* dum *Tanzani/o* = *Tan(ganjiko)* + *Zan(zibaro)* + /*o*. Ĉiuj lingvoj konas tiujn formojn. Sed tiu dueco tiklos la deĵorantajn logikistojn, se temas aparte pri Esperanto! Sed estus eraro sekvi ilin : unuj volus de ĉie formeti la *-i-*; la aliaj volus aldoni ĝin ĉien! Neniu pravus : la du nomoj estas tiuj donitaj de la popoloj mem aŭ de la registaroj ilin reprezentantaj. Ni, Esperantistoj, ne kreu novajn nomojn (pretenditaj pli bonaj?! pli logikaj!?) sed simple Esperantigu ilin. Ni ne rajtus diri "*Beneluxio*" kaj "*Tanzanio*"! Aŭ ĉu ni instruu la popolojn kiel sin nomi? Ĉu ni trudu al ili la inventaĵojn de iuj el ni? Aŭ eble iuj volas konsideri, ke la okazaĵoj interne de nia getto ne koncernas aliajn homojn? La Raŭmistoj certe ne aprobus tian obskurantismen!

En tio kuŝas plia avantaĝo de la esprimo *Ruslanda*. Ĝi ne modifas propran nomon de lando (*Rusio* estas elemento de la land-nomenklatur; sed *Ruslando* ja ne estas tia); ĝi estas nur esprim-rimedo propra al nia lingvo! Sed *-i-* fakte estas nomo per si mem. Tiu *-i-* estas la Esperanta formo de la internacia *\*-i-* (*-ia*, *ija*, *-iya*, *-ya*, *-ie*, *-ien* . . .), kiu praktike ekzistas en ĉiuj lingvoj kun praktike la sama uzado. Uzi ĝin kontraŭsence estas transbapti landon! Ĉu Esperantistoj opinias sin Agloj por arogi al si tian eksterordinaran rajton?

## Diversa misuzo de la nom-elemento -i- :

Misuzi la nom-elementon *-i-* estas netolereble! Tio kondukas al neeblaj situacioj. Iuj volas diri *Meksikio*, ĉar *Meksiko* estus urbonomo. Sed kiel esperantigi *New Mexico*? Ĉu ĝismedole logiki per *Nov-Meksikio* kaj eble kredigi, ke la ĉefurbo estas *Nov-Meksiko*? Aŭ eble *Nov-Meksikoj* estu ĝiaj anoj? Aliaj ial volas trudi *Ukrajnio* por la ĉiulingva *\*Ukrajn-*. Sed kiel ili do asimilos la sam-etiman Jugoslavan *Krajina*? Ĉu ili trudos *Krajnio*? Iuj aliaj - ĉar eraroj invitas al ankoraŭ pliaj eraroj, tiel plu senfine! - modifas la ĉiulingvan *\*Zair-* al "*Zairio*" sub preteksto, ke *Zairo* nomas ne popolon, sed riveron. Sed ĉu ili nomos *Malalta Zairio* la parton de tiu lando aŭ la riveron mem? Plie, kio pri *Kongo*? Ankaŭ ĝi nomas la saman riveron; kial ili do ne diras "*Kongio*"? *Gambio* estas rivero, ĉu la lando estu *Gambiio* aŭ ĉu la rivero

estu *Gambo*...

### La sesjara laboro de la Akademio

Certe la sesjara laboro de la Akademio ne kondukis al perfekta listo, mankas multo por tio kaj ĝi estus devinta rifuzi nomojn kiel *Ĉinio* kaj *Japanio*. La formoj *Japano* kaj *Ĉino* estas ofta stumblilo por ĉiulandaj komencantoj. Sed kreu min, kiel ĝi estas, tiu listo estas bona kompromiso kaj ni povas esti certaj, ke ĝi estas la sola rimedo sub dispono, por proponi al niaj samideanoj vere internacian nomaron, kiu plie certigas nin havi liston facile lerneblan, ĉar maksimume similan al la listoj, kiun la

**Peco B.** "Dum la tuta 19-a jarcento la Rusa registaro faris ĉion eblan por forviŝi la malgravajn (laŭ ĝia opinio) deviojn de la Ukrajna popolo disde la Grand-Rusa. Tre logike oni indikis, ke *Ukrajna* signifas "limlando", do ĝi neniel estas nomo de aparta nacio, ĝi estas nocio pure geografia. (S. Pokrovskij)

Ni estas feliĉaj, ke la Ukrainanoj fine liberigis sin de la Rusoj. Sovetio longe akuzis Okcidentanojn pri "koloniismo". Ni konstatas, ke ĝis antaŭ ne longe ankoraŭ ekzistis tuta vico da kolonioj, kiuj nun trovis la vojon al sendependiĝo!

Samideano Pokrovskij argumentas per la imperiismo de Sovetio, kiu volis neniigi la apartaĵojn de Ukrainoj per deklaro, ke ĝi estas nur limlando laŭ la etimologia signifo de la nomo. Ĝis tie ni aprobas lian koleron kontraŭ la imperiistoj. Sed mi nenie renkontis tiajn vortojn, kiuj ekster retoriko havas tian neimageblan influon! Plie tio neniel pravigas la Esperantistojn, kiuj pro tio volas ŝanĝi la ekzistantan nomon al "*Ukrajnio*" en la nura Esperanto!

Estas netolereble, ke oni modifu la principojn de Esperanto sub la preteksto, ke oni entreprenas eĉ justan lukton kontraŭ alia lando. Tio ne nur trafas la neŭtralecon de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ per tio la koncernitoj mensogas al si mem: ĉar la vera lukto estus rifuzi la malbonan nomon en la koncerna lingvo mem.

Oni bone komprenu, ke la situacio ne ŝanĝiĝis. Ĝi nur aĉiĝis! Ĉiuj scias, aŭ povas scii, la etimologian signifon de *Ukrajno* en la Ukraina mem. Ĉiuj plie povas do ekscii, ke

maksimumo de ni ĉiuj tra la mondo jam konas el sia nacia lingvo. UEA pro sia ne konsiderata mispaŝo kaj opono faris al la movado ursan servon. La Koreanoj kaj la reformistoj kiel instigantoj plej kulpas!

D-ro André ALBAULT

-----  
Legu la librojn de nia Prezidanto: *Vojaĝo tra la landoj* kaj ĝia suplemento: *Multlingva Glosaro pri Landnomoj*. (Iltis, 1991. 195 + 124 p.). Libroservo de UEA kaj ĉiu bona libroservo.

la Esperantistoj malbone asimilis la nomon de sia lando al Esperanto. La rilato al Rusio neniel ŝanĝiĝos per la modifo de Esperanto! Estas absolute ridinde konstati, ke Ukrainanoj volas lukti por pli bona nomo en la neŭtrala Esperanto! Tio estas senriska, sed ankaŭ senrezulta batalo! Pri tia lukto la imperiistoj eble nur duoble prifajfos? Sed eĉ ne: ili simple ignoras! Sed se ili estos sinceraj kaj kuraĝaj, la Ukrainanoj ekde nun komencos lukti, por ke estu trovita pli taŭga nomo en la Ukraina lingvo mem! Nur tiel ili povas esperi sukceson!

Transferi la lukton kontraŭ la imperiismo al vana lukto interne de nia lingvo estas ne nur pli ol vana, ĝi plie estas malbonaĵo por nia lingvo. Regulo por nia lingvo estas la Regulo 15 de la Fundamento: se nomo estas internacia, ĝi transiras al Esperanto sensanĝe! Punkto fino!

Aliparte, se la nomo estas malbone elektita, ĝi plej unue estas tia en la loka lingvo mem. Oni do ŝanĝu tiun unuokle! Tio eblas, se majoritato de Ukrainanoj opinias same. Estis aliaj nomoj por Ukrainoj. Nome *Rutenio* en la antaŭaj jarcentoj. *Bucovetia* en la malfrua Latino. Kaj popolo ĉiam kapablas trovi por si novan nomon, kiam li volas sin liberigi de nomo malplaĉa al si. Ekzemple, *Eskimo* estas Indiana nomo signifanta *krudkarn-manĝulo*. Tiun misŝatan nomon la koncernitoj rifuzas kaj preferas *ĉiskonigi* la nomon, per kiu ili nomas sin mem: *Inuit*, pluralo de *Inuk* (homo). Do *Eskimo* cedu antaŭ *Inuito*! Kion kapablis Inuitoj, ja certe iam kapablos la samnacionoj kaj ŝatantoj de Ŝevĉenko!

A.A.

## FETIĈISMO

*Letero de s-ro R. Haupenthal al s-ro István Ertl, redaktoro de "Esperanto" (1993-02-13)*

Kara István Ertl,

En la oktobra numero 1992 (p. 170) troviĝas redakcia noto, kiun rapidema leganto facile preterrimarkus, sed kiu ŝajnas al mi tamen grava. Temas pri via desupra bojkoto de Akademia decido rilate la formon de iuj land-nomoj. Se individua esperantisto – pro ajnaj kaŭzoj – volas malsekvi la akademian decidon (oni ne forgesu, ke oni ja petis tian decidon de la Akademio, sen meti al ĝi iajn kondiĉojn), tio estas lia afero. Alia afero estas, se centra organo de la Movado decidas ignori ĉi decidon kaj tial kvazaŭ provokas publikan ribelon.

Vi ja motivas vian decidon per fetiĉismo: la lingvo-uzo. Nu, ĉi-sama lingvo-uzo devigus nin fuŝi la akuzativon, uzi la participojn tempisme, konfuzi *igi* kaj *iĝi* kaj praktiki mil aliajn deviojn.

Oni atendus de vi (eĉ pli de via kompostisto, kiu tute silentu en ĉi afero) kaj de via Asocio, ke vi sekvu la decidon de la Akademio, ne ĉar ĝi estas io genia, sed tial, ke ĝi kontribuas al la lingva unueco. Se ne, ni fermu la butikon kaj ĉiu kiuos sian propran lingvo-supon.

Kun sinceraj salutoj,

R. Haupenthal

PS: Mi petas publikigon de ĉi letero.

[NDLR: La Redakcio de Esperanto nek publikigis, nek donis sekvon al tiu letero. La sorto de multaj aliaj protest-leteroj estis la sama! UEA senpune kondukas, kiel lingvo-reformanto!]

## Primitiveco de kelkaj adverboj

En artikolo (*La Letero de l' Akademio*, N-ro 23, paĝo 5), Cleber Lemos interesveke atentigas pri problemo en Esperanto. Ĉu ni konsideru la adverbojn *nepre*, *ofte*, *parkere*, *precipe*, *spite*, *supre* kaj *volonte* kiel primitivajn aŭ derivitajn? Jen miaj rimarkigoj pri liaj kvar proponitaj solvoj.

Respondo al la demando devas kaj respekti la vortfaradon en la nuna lingvo, kaj respekti la Fundamenton, kiu ja difinas la vortojn – aŭ almenaŭ ties uzadon – en 1905.

En la lingvo ne aperas iuj vortoj "neprea", "oftea", "parkerei" ktp. Tio jam ekskludas la solvon 3 (nome konsideri *nepre* ktp. kiel radikojn).

En la Fundamento la radikoj *nepr/*, *oft/*, *parker/*, *precip/*, *spit/*, *supr/* kaj *volont/* aperas ĝuste tiel, kun la signeto /, kiu indikas ke ili ne estas memstaraj vortoj, sed radikoj kiuj devas esti kompletigitaj per finaĵo por fariĝi vortoj. Kaj en la lingvouzo ja estas tiel. Tio ekskludas la solvon 2 (nome deklari *nepr*, *oft* memstaraj vortoj).

La solvo 4 (nome difini la koncernajn adverbojn kiel derivitajn) ne unuavide kontraŭas la vortfaradon: se oni deklaras, ekzemple, ke la radiko *parker/* havas verban karakteron, alivorte ke la verbo *parkeri* estas primitiva vorto, tiam la aliaj parencaj vortoj, ekzemple *parkere*, *parkerigi*, konservas siajn sencojn.

Tio solvo do ne ĝenas la vortfaradon, almenaŭ en ĉi tiu kazo. Ĝi ankaŭ similas iomete al la sistemo de *Plena Analiza Gramatiko*, kie oni kalkulas ĉiujn adverbojn kiel adjektivojn el la vidpunkto de vortfarado. Sed ĝi ne respektas la Fundamenton, ĉar laŭ la Fundamento *ofte*, ekzemple, estas adverbo, ne adjektivo. Aparte menciindas la substantivo *supro*, kiu ja estas en la Fundamento, sed kiel derivita de *supr/*. La solvo 4 ankaŭ ne respektas la principon, ke la primitiva vorto havu la plej bazan sencan, eliran por la vortfarado.

Tial mi opinias, ke ni devas doni al la sep menciitaj radikoj adverbajn karakteron, alivorte atribui primitivecon al la sep adverboj *nepre*, *ofte*, *parkere*, *precipe*, *spite*, *supre* kaj *volonte*. Al ili oni povus aldoni la adverbajn *prunte*, kiu same kiel la sep menciitaj, estas primitiva laŭ *Plena Ilustrita Vortaro*. Ili do estas same primitivaj kiel *baldaŭ*, kaj tamen finiĝas per *-e* kiel la neprimitiva *matene*. Tio estas la solvo 1. Kial nur derivitaj adverboj finiĝu per *-e*?

La solvo 1 proponita de Cleber Lemos, kiu estas ankaŭ tiu de *PIV*, estas do laŭ mia opinio la sola, kiu fidelas al la ekzistanta lingvo.

Christer Kiselman,

Membro de la Sekcio pri Gramatiko (AdE).

**LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO.** Trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet, 75017 PARIS, Francio. – *Redaktoro* : Jean THIERRY. – *Direktoro de la publikaĵo* : André BOURDEAUX. – *Presejo* : COCONNIER, 72300 SABLÉ. – *C.P.P.* : n-ro 6971. – *Prezo* : 1 n-ro : 40 FRF – *Jara abono* : 120 FRF – *Pagebla* : ĉe kontoj : Banka : Crédit Lyonnais n-ro 7090 F – Poŝtĉeka : 735 27 B Paris. – UEA : Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag) : nepre indiku "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto". Paralele avertu ĉe la adreso de "La Amikoj de l' Akademio".

### Perantoj por diversaj landoj :

Aŭstralio : Libroservo de AEA, Post Office Box 230, MATRAVILLE, N.S.W., 2036 Aŭstralio.

Azio (tuta) : S-ro UMEDA Yosimi, I.P.O.B. 5458, TOKYO 100-31, Japanio.

Beneluxo : Eldonejo kaj Librejo SONORIO. Doornstraat 22, B 2610 WILRIJK, Belgio. PCK 000-0152140-44. – Kreditkartoj EUROCARD, MASTERCARD aŭ VISA, JCB cards aŭ AMERICAN EXPRESS : sciigu numeron, validan periodon kaj la nomon de la kreditkarto. Ne forgesu subskribi Jarabono : 881 BEF (Telefona + telefaksa : +32 3 827 24 05. – tage kaj nokte + aŭtomata respondilo).

Brazilio : Brazila Esperanto-Ligo : ScS Ed Jockey Club – Sala 103. BR 70300 BRASILIA DF (Caixa Postal 11 11 05), Brazilo.

Germanio : S-ro Claus J. GÜNKEL, Im Lichtenfelde 70, D 33100 PADERBORN, Germanio. Poŝtĝiro Hannover (bankkodo 250 100 30), konto-n-ro 5706 31-301.

Kubo : S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (E-o-Redakcio de Radio Havano), Longa 220, apt 5, Mantilla, 13800 LA HABANA, Kubo.

Meksiko : S-ro Enrique LEMUS Rodriguez, Insurgentes Sur, 3493 villa Ilimpica edif. 27-001, 14020 TLALPAN MEXICO DF, Meksiko.

Svedio : Sveda Esperanta Federacio : c/o Lisbet ANDREASSON, Södra Rörum pl. 455, S 242 94 HORBY, Svedio.

Usono : Eldonejo Bero : P.O.Box 13492, BERKELEY CA 94701, Usono.